



# FLAM-ANALIZADO

FLAM-analizoj permesas pritakson de difinita organizo kaj situacio por trovi ĝiajn pozitivajn kaj negativajn aspektojn. Tion ni faras pere de kvar kategorioj:

- Fortoj: ene de la koncerna organizo
- Lamaĵoj: ene de la koncerna organizo
- Avantaĝoj: ene de la ĉirkaŭanta socio kie agas la organizo
- Minacoj: ene de la ĉirkaŭanta socio kie agas la organizo


Do, Fortoj kaj Lamaĵoj temas pri faktoroj, kiujn la esperan-tistoj povos mem regi aŭ influi. Kontraste Avantaĝoj kaj Minacoj temas pri faktoroj, kiujn la esperantistoj apenaŭ povas influi aŭ ŝanĝi, sed kiujn ili nepre devas atenti kaj kompreni, ĉar ili trudas sin el la ĉirkaŭaĵo en kiu la esperantistoj devas prezenti sin.

Analizado kompreneble konsistigas nur la komencan fazon – necesas el tiu analizo plue labori por proponi vojojn por solvoj. Ni faras tion laŭ la sekva skemo:

- Evoluigi la Fortojn
- Kuraci la Lamaĵojn
- Ekspluatu la Avantaĝojn
- Kontraŭu la Minacojn

Laŭ la komencliteroj, la solvoserĉa ekzerco nomiĝas **EKEK** !

## ANALIZO pri la junulara movado



**Temo de la nuna analizo:** La stato de la junulara movado en Hungario kaj najbaraj landoj.

**Evento:** Junulara Esperanto-Seminario, Eger, Hungario kun tre internacia partoprenantaro.

**Dato, loko, gvidanto:** La 28a ĝis la 31a de decembro, 2015 en Eger, Hungario.

**Partoprenantoj kaj daŭro:** 20 seminarianoj kaj du kaj duona horoj.

La ekzerco estis preni la rezultojn de la FLAM-analizo pri la junulara movado farita du tagojn antaŭe kaj el tio formuli solvojn, laŭ la principo EKEK – Fortojn ni Evoluigu, Lamaĵojn ni Kuracu, Avantaĝojn ni Ekspluatu kaj Minacojn ni Kontraŭu. Pri la FLAM-analizo ni ne havas detalajn notojn, sed la deciditaj temoj reaperas sube kadre de EKEK. La reagoj ĉefe aperas kiel reagoj al la malfortoj (Lamaĵoj kaj Minacoj). La nuno kreita el surlokaj notoj SMG. Pli da informoj de aliaj partoprenintoj estas bonvenaj.

### **FORTOJ** (kiujn oni devas evoluigi)

*SMG ne havas pri tio notojn. Supozeble, ni tuj transiris al Lamaĵoj, kaj tie notis la kurac-proponojn.*

### **LAMAĴOJ** (kiujn oni devas kuraci)

#### **Ni estas malmultaj**

- Engaĝu homojn – tiru homojn en gvidajn poziciojn.
- Donu konkretajn taskojn al novaj agemuloj kaj sekvi rezultojn.
- Subtenu denaskulojn, emfazu pozitivajn gajnojn el du- aŭ plur-lingveco.
- Kreu allogajn vidbendojn pri IIK (Infana Kongreseto) – Nitra kaj Seulo havas kapablulojn.

### **Malmultaj registritaj organizoj**

- La bezono kaj utilo de tio varias de lando al lando.
- Enlande varbu statutemulojn – UEA kaj TEJO liveru modelojn.
- Enlande varbu lertulojn pri subvencipetado (kio foje eblas nur post registriĝo).

### **Nevideblo**

- Zorgu pri bonaj retejoj – minimume dulingvaj, kun daŭra aktualigo de enhavo.
- La nacilingva parto prezentu tekstojn konvenaj por publiko; UEA/TEJO liveru modelojn.

### **Maldenseco de esperantistoj**

- Instigu partoprenon en kongresoj kaj eventoj.
- Emfazu la eblojn por reta kontaktado.

### **Lingva baro por kontaktiĝi kun ekstero**

- Fulmkurso por potencialaj aktivuloj – alireblaj sen granda kosto.
- Zorgu pri pli konvena bonvenigo por novuloj, ekz. en lokaj kluboj, kongresoj.
- Trejni instruistojn por altigi la lingvonivelon de la parolantoj.
- Strategio por mobilizi simpatiantojn, kio postulos uzon de nacia lingvo.
- Trejnado pri pozitivaj manieroj prezenti E-on nacilingve.

### **Malprofesieco**

- Disponigu eblojn por trejni homojn kiel pli bonnivele agadi.
- Dingu profesiuojn por pretigo de retpaĝoj kaj informiloj.

### **Misagorditaj homoj**

- Investu tempon, paciencon kaj trejnadon.
- Intensigu niajn trejprogramojn, por akiri pli da kapabluloj, por ke tiaj homoj ludu proporcie pli etan rolon.

### **Malakcepto de centra gvidado**

- La centraj organoj ofertu servojn al lokuloj, pli ol direktivoj.
- UEA starigu partnerajn rilatojn kun utilaj agantoj kiuj ne volas aparteni al centraj strukturoj.

### **Manko de signifaj mecenatoj**

- Iel montru, ke la esperantistaro formas indan merkaton, ekz. en kongresoj.
- IKEF estu invitita kunlabori pri tiaj streboj.

### **Troa dependeco je unuopuloj**

- Motoro por projekto utilas, eĉ necesas; sed ĉio ne kolapsu se la motoro ĉesas funkcii.
- Ĉiam projektoj enplektu kunlaborantojn – per trejnado kaj mitivigo kreiĝu pli da kapabluloj transpreni la gvidadon.

### **Monhonto**

- Riproĉado al tiuj, kiuj agas komerce pere de Esperanto.
- Fortigo de ligoj inter mono kaj profesieco kaj efikeco en la agado.
- Malemo plani finance por la evoluigaj kaj mastrumaj laboroj.

### **Tro vasta celaro**

- Ni evitu disipi niajn fortojn: necesas prioritati la projektojn.

### **Manko de kontinueco**

- En TEJO kaj junularaj movadoj, unu generacio ofte daŭras nur kvin jarojn.
- Ĉe TEJO grandega enfluo kaj elflue de membroj (50% jare), Necesas limigi tian membroperdadon.

- Necesas en junulaj movadoj ege rapida transdono de scioj kaj kapabloj.

## AVANTAĜOJ (kiujn oni devas ekspluati)

[SMG ne rimarkis, ke ni diskutis tiujn. Supozeble ni vidas tion sub 'minacoj']

## MINACOJ (kiujn oni devas kontraŭi aŭ almenaŭ mildigi)

### Ekonomia krizo

- Nova kotizsistemo – pli facila aliro – unu aliĝo por UEA / LA / Loka grupo.
  - Francoj jam funkciigas tian sistemon, ni rigardu la modelon.
  - UEA devas preti doni grupaliĝan tarifon por ebligi la modelon.
- Konsili pri nekostaj vojaĝebloj por atingi renkontiĝojn
- Akiro de subvencioj – nacie, internacie.

### Superrego de grandaj lingvoj

- Emfazu la lernfaciligan efikon de Esperanto.
- Engaĝiĝo de UEA/TEJO pri la defendo de lingvaj rajtoj.
- Emfazu la alispican karakteron de E-kontaktoj.
- Agi en politikaj rondoj por kontraŭagi la dominan rolon de la angla.

### Intervenemo ĉe junularo

- Starigu proprajn eldonaĵojn por aŭdigi la propran vidpunkton.
- Klarigu ke konsiloj kaj helpo bonvenas, sed entrudoj ne.
- Sendependiĝo de TEJO donas aŭtonomion kaj subtenas eksterajn rilatojn.
- Kompilu liston de homoj kapablaj doni intervjuojn, fari prelegojn ks.

### Lingvo de Pasinteco

- Ekspluatu reteblojn – ili atingos junulojn. Celu kvaliton por retpaĝoj.
- Arigu grafikistojn kaj kapablajn fotistojn por kreo de modernecaj flugfolioj kaj retejoj.

### Malengaĝiĝemo, superŝutiteco

- Trejni averaĝajn homojn pri retroŝta optimumigo – por ne droni en mesaĝoj.
- Verku mallongajn tekstojn kun klara strukturo – atentoeltenoj ŝrumpas.
- Metu rezultojn de AMO en la reton (*SMG: laboro okazas - malrapide!*)
- Organizu mallongajn trejnkursojn, disponigu gvidilojn.
- Konigu eblojn por volontulado pere de Eo.
- UEA sekvu la modelon de TEJO en nomumo de estrarano pri homaj rimedoj.
- Zorgu pri la pli glata enkomunumigo de novuloj.

### Manko de prestiĝo

- Altigi la kvaliton de niaj retejoj, komunikado kaj servoj
- Trovi subtenantojn inter la intelektularo (deflankismo)

## FLAM-ANALIZOJ

FLAM 1:	Junio 2014	Pri la movado en Bulgario (farita ekster la kadro de AMO).
FLAM 2:	Aŭgusto 2014:	Pri la movado en Italio kaj en Eŭropo (kadre de AMO 5)
FLAM 3:	Oktobro 2015	Pri la funkciado de Kulturcentro Greziljono (kadre de AMO 15)
FLAM 4:	Decembro 2015	Pri la junulara movado en Sudorienta Eŭropo (kadre de AMO 17)
FLAM 5:	Aprilo 2016	Pri la movado en Danlando kaj Skandinavio (kadre de AMO 24)